

R. TOBELLÀ

Eidonisto de CLAU ESPERANTO kaj POŝVORTARETO

18, Carme, 18 - Barcelona
ESPERANTA PRESEJO

TUTMONDA ESPERO

Organo de la kataluna esperantistaro

Aperas nur en esperanta lingvo: literatur-entanda kaj eksterlanda movado, rakontoj, amuzajoj por instruada praktiko k. t. p.

3ARA ABONO / Ekster Hispanujo. 4 frankoj (1'60 sm.)
En Hispanujo . . . 3 . . . (1'20 ")
UNA NUMERO 40 cimoj, (0'16 sd.)
Per la abonantoj kaj kunlaborantoj 25 . . . (0'10 ")

Spocimona (nenomita numero) estas ricevebla po sia valoro.

Ĉiuj mesaĝoj devas esti akompanataj de mono.

Ĉiuj monsendoj estu farataj per germanaj, francaj aŭ hispanaj poŝtmarkoj; per franca, rusa aŭ hispana papermono; per internaciaj respondkuponoj de 10. sd. kaj per ceko aŭ tranŝapapiloj de la Cekbanko Esperantista.

Oni bonvolu skribi legeble sur respondpoŝtkarto, aŭ aldoni respondkuponojn al la letero, se oni postulos respondon. Ĉiu nova abonanto ricevos senpage la eksterordinaran numeron de la V.^o Kongreso, samtempe ke li havos la raltan aktiri la kolektojn de la jaroj 1908, 1909 kaj 1910 por la duono de sia valoro, t. e. po 1'50 fr. (sm. 0'60) ĉiu kaj, kiel la ceteraj abonantoj, povos mendi, por unu fojo dum la tuta jaro, trilinean anonconon.

ABONEJOJ

Francaje: Librejo de Esperanto,
15, rue Montmartre - Paris

Katalunaĵo:
S-roj Suñer kaj K.^o, Presejo - S. Felu Guixols.

S-ro Rosals - Portaferriça, 30, Barcelono.
S-ro J. Palmerola, R. Major - Vic.
S-ro J. Quintana, Cases Noves - Palafrugell.

TARIFA POR ANONCOJ

Tuta paĝo. . . 12 frankoj (4'80 sm.)
Duono da paĝo 7 . . . (3'80 ")
Kvarono . . . 3'50 . . . (1'40 ")
Okono . . . 2 . . . (80 sd.)

Anoncoj por peti-korespondadon kostas 10 cimoj (4 sd.) ĉiu linio.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
Tallers, 81 - Barcelono

Per administraĵoj aliaj sin turni al S-ro B. Anglada



LAMPARA C.

de filament metalle

Renneix totes les ventatges de la millor estrangera

Dura 2000 hores i es la més resistant

i un 40% mes barata

Preu unic, de 16 a 75 bugies, 2 PESSETES

Deposit i venda á BARCELONA:

Rambla de les Flors, 16, entlo

Oni parolas kaj korespondas komerce per Esperanto

★ ★ Esperanta ★ ★ Biblioteko Internacia

Tiu-ci biblioteko enhavas facilajn legajojn de diulandaj eminentaj esperantistoj. Ĝi tial bonege taŭgas per ekzercado de la lingvo ĉu dum la grupaj kunvenoj ĉu per privata legado.

Prezo po kajero 0,10 Sm (0,20 M.)
Serie de 12 volumoj (alirakite) 1,25 Sm (2,50 M.)
Ĉiu libro enhavas 40 - 50 paĝojn.

Esperanto Verlag Möller & Borel

Berlin S. W., Linden - Strasse 18 - 19.
Por Hispanujo: Joan Rosals, Barcelono, strato Portaferriça, 30



Bazar Esperantista

Specialase en la mezuro de ĉamizoj por viroj. Konfektejoj por sinjorinoj kaj golafanoj, kravatoj, poŝtuko, gantoj, parfumo, trikotajoj kaj aliaj artikoloj.

Trafalgar, 2 - Junqueres, 18
BARCELONO

TUTMONDA ESPERO



Barcelona, Februaro 1911

40 cent.

MISTERA KRIMO

Amuzaj unuakta komedietoj. 1 fr. (0'400 sm.)

Mendebtaj ĉe MIKHAĚLO CASES, Strato Salmerón, 229, 4.º - Barcelona (Espana)

Unu fojon...!

Humoraĵaro taŭga por la Esperanta lernado. 0,30 fr. (0'120 sm.)

NI DANREGOS LA ANONCAN INTERSANGON

OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA, organo de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj. Jarabono: fr. 5 (sm. 2). Centra Oficejo, 31, rue de Clichy, Paris.

LINGVO INTERNACIA, centra organo de la esperantistoj. Ĉefredaktoro, Th. Cart, 48 paĝoj da dense presita teksto en plej korekta kaj plej klasika stilo. Jarabono: 5 fr. (2 sm.)

JUNA ESPERANTISTO, monata Gazeto Beletristika por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj. Jarabono: 2'50 fr. (1 sm.); Ambaŭ kune: 6'25 fr. (sm. 2'50).

LA REVUO, internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de D-ro L. Zamenof, ĉe Hachette kaj K.º, 79, Bd. St. Germain, Paris. Jare (francujo), fr. 6; eksterfrancujo, fr. 7 (sm. 2'75).

FRANCA ESPERANTISTO, monata organo en franca kaj esperanta lingvoj. Administracio, 46, Boul. Magenta, Paris. Jare, fr. 4 (sm. 1'60); francujo, fr. 3.

GERMANA ESPERANTISTO, monata gazeto por la vastigado de la lingvo Esperanto. Jara abonprezo, 3 m. (1'50 sm.) en ĉiuj landoj; prova abono por 6 monatoj, 1'50 m. (sm. 0'75). Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin SW. 58. Lindenstr. 18-19.

LA ONDO DE ESPERANTO, ĉiumonata regule-perioda organo de rusaj esperantistoj. Jara abonpago, 2 rubl. (sm. 2'12). Tverskaja, 26, Moskvo, Rusujo.

THE BRITISH ESPERANTIST, oficiala monata organo de B. E. A. Jarabono: s. 3 (f. 4). 1'60 sm. Ĉe la Sekretario de la B. E. A., 133-136, Hig Holborn, London W. C.

VERDA STELO, monata oficiala, organo de C. M. E. Redakcio, 1.º Aduana Vieja, n.º 4; adreso: apartado 2759, Mexico, D. F. Jare: doll 1 (sm. 2).

INTERNACIA SCIENCA REVUO, Monata-Verlag Eldonejo, Közchenbroda-Dresden. Jare: fr. 7 (sm. 2'75).

BELGA ESPERANTISTO, monata organo de B. L. Ĉe S-ro Oskar Van Schoor, 20, Vondelstraat, Antverpeno. Jare: (en Belgujo, fr. 4) fr. 4'50 (sm. 1'60).

GAZETO HISPANA, oficiala organo de Hispana Societo p. p. Esperanton kaj de la aliĝintaj Grupoj. - Abonprezo: 1'20 sm. (3 pesetoj) jare. - Sidejo de la Administracio: N. Torrero, 10. - San Fernando (Cádiz).

LA SPRITULO, monata internacia gazeto por ĝerco, humoro kaj satiro. Ĉe Richard Bresch, Tolkewitzerstrato 20, 1 (Germanujo). - Jare: mk. 2'50 (sm. 1'20).

DANUBO, internacia gazeto redaktata nur en Esperanto, eliranta post la 15 de ĉiu monato. Strato I. C. Bratianu, 5. Bucaresti (Rumanujo). - Jare: 3'50 fr. (1'40 sm.)

NOVA SENTO, organo de la Vaska Esperantistaro. Aperas ĉiumonate. Strato Jardines, 7, Bilbao (Hispanujo). - Jare: En Fremdlando, 2'25 pesetoj (0'90 sm.); en Hispanujo, 1'75 pesetoj (0'70 sm.)

TUTMONDA ESPERO

Ĉiumonata ilustrita revuo organo de la kataluna esperantistaro

Redakcio kaj Administracio: TALLERS, 81-BARCELONO (Societo «Espero Kataluna»)

4ª Jaro

Barcelono, Februaro 1911ª

N-ro 36

ENHAVO: Kiam, kial, kiel, kaj kie mi devenis esperantisto. — La festo de la orientaj reĝoj. — Intima. — La morto de l' Paŝtisto. — La antikvaj monumentoj de Barcelono. — Regno de homoj. — Gedonacantoj por la ordeno de Isabel la Katolika al S-ro. D-ro L. L. Zamenhof. — Ĉiam antaŭen. — Diversaj sciigoj. — Bibliografio.

KIAM, KIAL, KIEL, KAJ KIE MI DEVENIS ESPERANTISTO

Karaj samideanoj: Ian tagon de la septembra monato de 1902ª mi renkontis sur strato de Valencio (Hispanujo), tre karan amikon kiu, post afabla saluto, parolis al mi pri kaj pro Esperanto kaj invitis min al la lernado de tia lingvo internacia. Ĝentile mi aŭdis lin kaj respondis ke mi nune ne estis ema al studado de la fremdaj lingvoj, aĵo kiun de longe mi forgesis tial ke mi estis dediĉata fervore al sciencoj matematikaj; ni adiaŭis kore kaj dum du jaroj, ĉiam kiam ni nin revidis unu la alian, okazis la sama sceno ne fruktedona por mia varbado. Mi kredas ke bedaŭrinde li ne sukcesis tial ke la strato ne estas ejo definitiva por varbi iun ajn. Pasigis la tempon kaj dum la aŭgusta monato de 1904ª kiam mi someris en Nazaret, pentrinda vilaĝeto starigita ĉe la marbordo je kvar kilometrojn de Valencio, vizitis min kapitano Duyos unu el miaj plej karaj lernintoj de matematikoj, estiminda kaj—ebla amiko. Post interparolado pri diversaj aferoj li subite diris al mi.—Ĉu vi ne aŭdis ion pri Esperanto?

— Jes, jes, de du jaroj S-ro G. ĉiam kiam li trovas min, intencas senfrukte varbi min, sed mi kvankam ĝentile rifuzas tion; tiam mia interparolanto enmetis sian dekstran manon en la poŝo de sia jakto kaj eltiris broŝureton titolitan « Esperanto. Kio estas tio? » kaj ĝin donis al mi dirante, mi petas de vi, kara profesoro, ke kiam mi adiaŭos vin, bonvolu legi tiun verketon kaj, kiam ni revidos nin denove, interparolos pri la sama afero.

Mi promesis fari tion, kaj efektive, tuj kiam mi restis tute sola, profitante la lastajn radiojn de la bela sunsubiĝo mi tralegis la broŝureton kaj nerva kaj saltante sur mia lulseĝo mi diris al mi mem «tio estas lingvo matematika! Kiel bone artefarita! Ĝi estas mirindega!»

La sekvantan tagon mi aĉetis la esperantan gramatikon de Inglada y Villanueva, kaj komencis fervore kaj entuziasme la lernadon. Unu monato sufiĉis al mi por bone traduki kaj korespondi kun fremdaj samideanoj kaj tri por paroli flue kaj kuraĝe. Lernu Esperanton karaj novvarbitoj kaj sendube vi atingos la celon kiel via sindonema samideano.

ROMAN AYZA

Staba subkolonelo; Eksprezidanto de H. S. p. p. E.

LA FESTO DE LA ORIENTAJ REĜOJ

- Ĉu Viaj Reĝaj Moŝtoj permesas ke mi eniru ?
 — Ne eble.
 — Pardonu, Reĝaj Moŝtoj, sed estas eksterordinara afero tiu kiu kondukas min ĉi tie.
 — Tute ne eble, mi ripetas; ni al ĉiuj malpermesis la eniron, kaj neniu povas nin ĝeni dum ni faras la ordigadon de la ludiloj.
 — Mi bone tion scias Reĝa Moŝto, sed estas ne atenditaj leteroj kiuj venigas min ĉi tie.
 — Nek vorton plu, revenu al via apartamento, kaj daŭrigu vian taskon kolektante la infanajn leterojn.
 — Pardonon, mi repetas! sed kelkaj el tiaj leteroj estas skribitaj per vortoj tute ne konataj de mi.
 — Kion mi aŭdas? Ĉu tiaj leteroj ne estas skribitaj kiel l' aliaj?
 — Tute ne Reĝa Moŝto, kaj tiu estas la kialo de mia embaraso.
 — El kie vi forprenis tiujn leterojn.
 — El la leterujo de *Espero Kataluna*.
 — Alportu ilin ĉi tie, kaj vi iru daŭrigi vian taskon.

**

Kiam la servisto estis foririnta la reĝo Melĉoro malfaldas unu el la leteroj ĵus alvenintaj, kaj tre atente komencas ĝian legadon. Tiel atentege li legas ke altiras la rigardojn de la reĝo Gasparo kiu scivolema iras al li kaj prenante unu el la aliajn leterojn kiuj kuŝas sur la skribtableto ekkomencas ĝin legi.

La reĝo Baltazaro kiu kaŭrita finas la envolvon de granda pakaĵo, levigas kaj viŝante sin, ĉar multe li ŝvitas, deturnas la kapon kaj rimarkas ke siaj reĝaj kunuloj preterlasis la pakaĵfaradon kaj nur ili atentis pri legado de leteroj. Strange! li diras al si, kiel miaj amikoj flanken forlasis la disdonadon de la donacoj kaj nur atentis pri tiuj novaj leteroj? — Li alproksimiĝas kaj tiel interrompas ilin:

— Kio ti maniere altiras vian atenton?

La Reĝo Gasparo ridetante respondas: Ĉu vi aŭdis ion pri la lingvo internacia Esperanto?

— Certe ne, respondas la nigra Moŝto, ĉar meze de l' Afriko kie mi loĝas, tre malofte alvenas sciigojn de l' Eŭropo.

— Aŭskultu do atente tian rakontindan historion: Antaŭ du mil jaroj proksimume, ni renkontis nin sur vojo. Nia celo estis la sama. Lumiga stelo nin gvidis kaj dank' al ĝi ni atingis trovi la Dian Infanon ĵus alvenintan al tiu ĉi mondo.

Tuj kiam ni lin adoris, nia misio estis plenumita. Ni intencis foriri, sed la Dia Infano nin haltigis kaj al ni demandis: Ĉu vi deziras kelkan favoron mian?

Tiam mi respondis: Dia Moŝto, ĉar vi venis al tiu mondo por savi la homaron kaj pligrandigi la interfratiĝon de la ĉiulandaĵ homoj, bonvolu doni garantie tion kion ili bezonas por fini vian Dian agon.

Restis iomete pensema la Dia Infano, levis fine sian belan maneton kaj fingromontrante la kvinpintan stelon kiu estis nia fidela gvidanto dum nia longa vojaĝo, diris: Jen kion vi deziras. Post kelkaj jarcentoj el tiu sama stelo fluos ilon per kiu la homaro fine atingos la deziratan interfratan amon, kaj per ĝi la muroj kiuj staras limigante la diversajn landojn, disfalos teren kiel la malfortika kreskaĵo falas puŝita de forta blova ventego—kaj nun tiel okazis. — Tiu stelo, kiu dum tiom da jaroj migris tra la ĉiela spaco, ne altirante la atenton de la sciuloj, taŭgis por ke pola klerulo elpensus novan interkomunikilon plenumiĝante tiel la antaŭdiro de la Dia Infaneto.

**

Kaŝis la Orientaj Reĝoj la leterojn kaj foriris por aĉeti tion kion petis de ili la esperantistoj de *Espero Kataluna* sed ĉar la noktmezo alproksimiĝis kaj ili havis ankoraŭ multajn farotajn aferojn, rapidante ili forgesis du leterojn sur la skribtableto. Dank' al grava trinkmono kiun mi donacis al drinkemula paĝio de la reĝo Baltazaro mi sukcesis atingi la forgesitajn leterojn kaj tiel kontenta tiu servisto estis, ke ankaŭ pruntedonis al mi verse-ton verkitan de la reĝoj mem respondante al la leteroj de la ĉarmaj esperantistaj fraŭlinoj.

Mi fidas ke la legantoj de TUTMONDA ESPERO, ne blovos apud la reĝaj oreloj tion kion mi presigas ĉi tie, kaj mi nur bedaŭras ne posedi la aliajn leterojn por ilin ankaŭ prezenti antaŭ la scivolemaj okuloj de miaj karegaj legantoj.

Jen do unue la poezieto de la reĝoj kies nomoj estas kaŝitaj sub la anstataŭnomo Moratò:

«Iliaj reĝaj kaj magiaj moŝtoj Melĉoro, Gasparo kaj Baltazaro al ĉiu fraŭlino de *Espero Kataluna*; kiu skribis al ili.

Alveninte en la teron,
 Vian ĉarman petleteron
 Ni ricevis;
 Kaj kun ĝojo ni konstatis,
 Ke vi venon nian ŝatis,
 Pri ĝi revis.

Tuje ni interparolis,
 En la kapoj niaj bolis
 La projektoj,
 Kaj post longa diskutado
 Decidiĝis l' aĉetado
 De l' objektoj.

Sed ni petas vin pardonon,
 Havis ni malmultan monon,
 Kaj pro tio

Moku l' donon ne, fraŭlin',
 Eĉ se ĝi ve taŭgos vin
 Por nenio.

Ĝin rigardu kun bonvolo,
 Estu ĝi por vi simbolo
 De fratamo.
 Ĉu ne estas ni kunuloj?
 Brilu do viaj okuloj,
 Per gajflamo.

Tiel vi ĉarmegemagos;
 Tiel vin «los reyes magos»
 Dankos korece al ni
 Se vi plie nin permesos
 Kun vi danci, ni ne ĉesos
 Laŭdi vin laŭte kaj hore.

(1) Reĝaj Moŝtoj. *Kast.*

Barcelono, la 5^an de Januaro de la jaro 1911^a

La leteroj estas la jenaj:

«Al liaj Reĝaj Moŝtoj; Melĉoro, Gasparo kaj Baltazaro, en Oriento. Altestimindaj potenculoj!

La ĝojego premis mian koron je la sciigo, ke Viaj Reĝaj Moŝtoj Esperanton komprenas, tiu de mi multamata lingvo. Tial ke ĝi fratigas ĉiujn homojn, mi, kiu estas tute sensignifa personeto, kuraĝas hodiaŭ min turni al Viaj Ĉiosciaj Moŝtoj per la jena petletero.

Mi havas fraton kiu, strange sed tamen vere, malŝatas muzikon. La bruego, kontraŭe, lin ĉarmas.

Mi deziras do, de Via ĝentileco... sed ĉu mi kuraĝos fari mian laŭŝajne strangan peton?... Nu! Jen ĝi... ke Vi bonvolos komplezi min per la alsendo de tambureto... Jes, karaj Reĝaj Moŝtoj. Vi bone legis. «Tambureto», por Via humila servantino.

Mi konstatas ja, ke tio estas ne deca donaco por fraŭlino, sed kion Vi volas! Mi tre amas mian fraton, kaj jen, mi suferas kiam li estas ĝenata.

Do, bonaj Reĝetoj! Se lin iafoje tedas mia fortepianludado, mi ĝin anstataŭos per duonhoro de senĉesa frapado sur la de mi petita tamburo, por plezurigi liajn fratajn orelojn.

Pardonu mi petegas, ho Ĉiopovaj Sinjoroj, se mi trouzis de Via boneco, per mia stulta tamburopeto, kaj sciu ke se tiu donaco estas malfacile trovebla, Via servantino ankaŭ kontentiĝos per ia ajn sukeraĵo, ĉar ŝi estas nemezureble frandema!

Antaŭdankante Viajn Reĝajn Moŝtojn, kaj dezirante al Vi feliĉoplenan vivadon dum la 1911^a kaj multaj sinsekvaj jaroj, mi restas kun respekto Via humila samideanino, kiu permesigas, pense kisi viajn orumitajn mantelojn.

Dolnjo

**

«Barcelono la 5^an de Januaro 1911^a

Al la Reĝaj Moŝtoj de Oriento.

Mi ne scias kiel min turni al viaj Reĝaj Moŝtoj, mi estas tiel timema... Kelkaj el miaj amikoj sciigis al mi, ke tiun-ĉi jaron viaj Reĝaj Moŝtoj faros grandajn aĉetaĵojn ĉe Esperantujo nur por kontentigi la fraŭlinojn de *Espero Kataluna*.

Tial ke vi estas tiel multe ĝentilegaj, ili konsilis al mi, ke mi multe petu al vi, sed mi tion ne faros, ĉar mi estas tiel timema... Ho! se vi konus miajn dezirojn, miajn revojn kaj miajn iluziojn! Ili estas grandaj, grandegaj, preskaŭ ne kompareblaj!... sed, ĉu iam ili efektiviĝos? Mi ne scias, eble jes, se mi ilin sciigus al viaj Reĝaj Moŝtoj, sed mi estas tiel timema...

Por ne tro uzi vian bonecon mi nur petos al viaj Reĝaj Moŝtoj malgrandan bagatelon. Viaj Reĝaj Moŝtoj kontentigos min nur per la donaco je kvar etaĝa domo starigita ĉe la placo Katalunujo; sed ĝi devas esti lukse meblita laŭ la jena ordo:

La malaltaĵo de tiu-ĉi domo kiu sendube estos admirindega arta konstruaĵo, devas esti granda veturilejo enhavanta kelkajn aŭtomobilojn, vetu-

rilojn, kaj kompreneble luksajn ĉevalojn. Tiel la esperantistoj neniam plu iros piede!

La unua etaĝo estos nur lernejo, sed ĝi devas enhavi komfortan salonon por la komitataj kunvenoj. Ankaŭ, grandan bibliotekojn kies bibliotekujo estu kompleta kaj kie oni trovu bonan kolekton da libroj konsistantaj el mil peseta banka bileto ĉiu folio. Ni havas konfideman bibliotekiston!

Mi petegas al viaj Reĝaj Moŝtoj, ke en la lernoĉambro estu veluraj apogseĝegoj ĉar tiel, eble la gelernantoj ne laciĝos resti en klaso.

La dua etaĝo konsistos el kafejo kaj bilardejo; kaj la tria, devas prezenti ĉarman teatrejon kaj ankaŭ dancejan salonegon, kies luksaj meblaroj devas esti el la plej superantaj. Krom ordinara homlevilo, devas esti alia speciala por supreniri al la teatra etaĝo.

La kvara etaĝo, estos por la geservistoj, tamen ĝi devas esti bone aranĝita.

Viaj Reĝaj Moŝtoj vidas, ke miaj petoj estas modestaj; per malmultaĵo mi kontentiĝas, mi ne kuraĝas tro uzi vian afablecon, mi estas tiel timema...

Atendante de la bonvoleco de viaj Reĝaj Moŝtoj min vidi kompletita pri mia senvalora peto, mi submetigas al vi plej sincerajn respektegojn.

Timemulineto.

**

Post la disdonado de la donacoj, la fraŭlinoj ricevis belajn bukedojn, kaj tre ĝojega balo estis la fino de tiu festo, kiun sendube ne forgesos la ĉesintoj.

F1

INTIMA

Katalune verkita de **Claudi Mas Jornet**

Al mia filo

I

Manprenu, forte manprenu ĉe la mammo de cia patrino! Suĉu fervore, sovaĝe, la lakton kiun ameme ŝi donas al ci! Suĉu fileto, ĝis kiam estos sa-tinta kaj poste dormu, ridu, babilu, fleksiĝu... daŭrigu cian Impulson!

II

Ĉu ci ensorĉiĝas antaŭ la lumo? Ĉu ci volas ĝin kapti? Venu ĉe miaj brakoj, filo de mia koro, kaj cin mi kondukos apud ĝi. Tiel: ĝin petolu. Ebriĝu da lumo! Satiĝu kiel ludema papilio! Ja cin atendas la Mondo por cin ĉirkaŭi je mensogoj.

III

Daŭrigu cian Impulson sen timo. Nun ci estas libera, filo mia! Nun ci estas tute libera! Duonjara! Feliĉa aĝo! Mi volus reveni tiun ĝojan kaj liberan aĝon, kiam la koro nek la kapo konas la korpremilojn.

IV

Neniu rabas cian ripozadon nek cian alimenton: neniu disputas cian gajecon. Ĉiu kiu cin vidas cin festas: ĉiu cin dirlotas kaj kompleksas. Ĉiu cin estimas, ĉar nenion de ili ci bezonas, nek ion de ci neniu povas ŝteli. Sed ĉiu cin estimas.

V

Vivu, filo mia, vivu senkonscia, ĉar nun ĝuas entute la Vivon. Ci ne rememorigas la Hieraŭon, nek cin priokupas la Morgaŭo, ci vivas la Hodiaŭon kaj ĝin scias vivadi. Tio estas la Vivo. Tio kaj nenio plu ol tio. Vivu senkonscia.

VI

Se mi povus haltigi la horloĝon de la Tempo, mi tuj volonte tiel faros, pro tio ke ĉia Estanteco estu senfina. Mi eternigus cian Hodiaŭon kiu estas ĉia ĝojo, pro cin ne kaptus la Morgaŭo kiu estas la Morto.

VII

Sed la Tempo turniĝas rapide kaj la Momentoj pasas kurantaj. La morgaŭo, la pereiga tago, la timigita Morto alproksimiĝas. Kiam mi ĝin vidas tiel proksima, ne scias ĉu mi plendus estu fruktiginta mian koron.

VIII

Alproksimiĝas la tago kiam la Mondo cin englutos. Alproksimiĝas la tago kiam oni sklavigos cian penson, cajn afekciojn, cajn sentojn, cian korpon, tutan cin. La Mono zorgos cin malvirtigi kaj cin subjugi, kaj tiam la penado vivigos ĉe ci la Morton.

IX

... Sed min pardonu, filo mia, kaj min ne aŭskultu! Mi ne volas vekigi cian konscion pro ne maldolĉigi cian vivĝojadon. Vivu senkonscia cajn bluajn tagojn kiel la etendiĝanta maro, ĉar tio estas la Vivo: tio kaj nenio plu ol tio.

X

Kaj kiam ci estus enirinta en la Mondo luktu! malcedu! tute malcedadu! Batalu kuraĝe defendante cian liberecon, kaj cin ŝirmu je la virteco, tiel almenaŭ ne mortos entute. Protestu inde, tiel almenaŭ vivos ĉe ci mem.

XI

Vivu, vivu, filo mia! Vivu la Momenton kiu decas al ci! Manprenu zorge ĉe la mamō de ĉia patrino, kaj per ĝia lakto kaj miaj konsiloj fortiĝu por la Morgaŭo. Vivu bone, ĉar ĉia vivado longigas la mian. Je ci mi estas. Por ci mi sentas min senmorta.

Tradukis A. B.

LA MORTO DE L' PAŬTISTO

Mortis la paŭtisto
de l' neĝa val';
malgaje nun pepas
la najtingal'.

* *

Funebre sonoras
la sonoril',
perdiĝis de l' suno
la ĉarma bril'.

* *

La montoj florantaj,
nun ploras lin,
La sun' paliĝante
prezentas sin.

* *

La marĉoj revantaj
je lia mort',
plendas ĉiam vane
kun tuta fort'.

* *

Nun ne la feinoj
revas pri am',
ĉar tiu paŭtisto
mortiĝis jam.

* *

Ne fluas riveroj
kun dolĉa bru',
kaj estas funebra
lia flu'.

* *

Ne havas li, filojn,
ankaŭ edzin',
nek fraton bonkoran,
plorantajn lin.

* *

Lin ploru, do, montoj
de la freŝec',
eterne florantaj
sub la helec'.

* *

Vi kiuj ja estis
dum la somer',
liaj kunulinoj,
lia esper',

* *

lin kovru per kantoj
tutaj parfum';
por li ne ekzistas,
jam milda lum'!

* *

Soleca kabano
de la paŭtist'
de kiu vi estis
bona gardist'.

* *

Al li horu preĝon,
en la ĉiel',
ĉar liaj la kantoj
estis miel'...

* *

... kiun ĉiutage
oferis li
al vi, dolĉ-kabano
de l' harmoni'.

* *

Ploru, ĉiuj marĉoj
kaj leinar';
ploru, plendu, voku,
riveretar'.

* *

Ĉar via amiko
de la kanflut',
ne ludos plu sian
belan disŝut'!

* *

Ploru, ĉiuj steloj,
ploru, l' arbar';
kaj sonu funebre,
la trumpetar'!

* *


Ĉar kiun vin amis
per ama kor',
fornabis maldolĉe
kruela mort'!

* *

Mortinta jam estas
por ĉiam, li;
en ĉiel' lin tenas
la bona Di'!

JOSEF VENTURA

Terrassa



Facado de la preĝejo de «Santa Maria del Mar»

kiuj ja estas malpli gravaj. Apartenas al la transira periodo dum kiu ekvidiĝas jam la Renesancartaj tagiĝlumoj, la antikva palaco de la Generaleco de Katalunlando kie estas lokita la arĥivo de l' Krono de Aragono, la domoj de la Ĉefdiakono, tiuj de la «Canonja» kaj multaliaj malpli gravaj en la antikvaj kvartaloj de la urbo.

La preĝejo de S-taj Justo kaj Pastor, en la Sta. Justa placo, estas certe interesa, ĉar, estinte, ĝi estis Katedralo, kaj tute kromumita ĝi estas.

Tiu de Sta. María del Pi, ekkonstruita dum la XI^a jarcento, kaj daŭrigita dum la sinsekvaj, enhavas karakterizaĵojn de ĉiuj fazoj de la stilo; ĝi estas salonplata, kaj havas en sia altaĵo belajn fenestregojn kaj ĉarman rozsimplan arĥitekturaĵon en sia ĉefa facado, de kiu ankoraŭ estas roma la flanka pordo.

La «Sta. María del Mar» preĝejo, apartenante la XIV^{an} jarcenton, konsistas el tri navoj, interspacigitaj per belsajnaj fostoj kiuj subtenas la grandegaj arkaĵoj de belaj kruciĝoj. La facado estas modelo de l' ogiva arto, kaj en ĝia internaĵo, krom aliaj skulpturjuveloj, estas rimarkinda bela sarkofago romkristana.

La preĝejo «Sta. Águeda», malgraŭ ĝi estis forlasita por la kulto, ĉar nune ĝia murzono enhavas la provincan Muzeon, estas interesa tial ke antaŭe ĝi estis la

LA ANTIKVAJ MONUMENTOJ DE BARCELONO


(Daŭrigo)

La preĝejoj de «Sant Just», «Santa Maria del Pi», «Santa Maria del Mar», «Santa Águeda», «Sant Antoni Abat», la «Purissima Concepció» kaj la «Seu», formas la kristanan prezentadon de la ogiva ciklo, kaj la civila arĥitekturo de tiu periodo en Barcelono, estas formata de la galerio, la «Saló de Cent» kaj la antikva facado de la «Urbdomo», la Palaco de la malnova Audienco, la salono de kontraktoj de la «Llotja» kaj kelkaj apartaj konstruaĵoj, kiel la palaco de la duko de Solferino, kaj aliaj


kapelo de la reĝoj de Aragono, kaj ĝi havas lignan plafonon, subtenita de duopaj traboj, pure kromumitaj, kiuj sin apogas sur belvidiĝaj kaj fortikaj arkaĵoj.

La preĝejo de la «Purissima Concepció», starigita sur la strato Aragón, estas unu el la plej belaj de la gota katala arto. Ĝi havas, same kiel tiu de «Santa Águeda», belan klostron, kies arkaĵoj estas subtenataj per maldikaj kolonetoj, finitaj per la karakterizaj kapitejoj de la gota stilo, nomita de la «Corona d' Aragón».

Estas interesa, kvankam ĝi datumas de la tria triono de la XIX^a jarcento, la statuo de la «Purissima Concepció», kiun oni respektigas en la ĉefaltaro, marmore skulptita kaj multe kromumita, verko de la katala skulptisto Sinjoro Johano Samsó. Tiu preĝejo staris antaŭe sur la placo de «Junqueres», kaj oni ĝin traslokigis kie nune estas, dispeciginte ĝin ŝtono post ŝtono.



Reĝa kapelo de «Santa Águeda»



Klostro de la preĝejo de la «Concepció»

REGNO DE HOMOJ

Neĝkolora, pensema, sublipe
Fleksiginta la fingro de mano
Sidigita sur tur' ĉielano
Ploras forte batita sentvipe.

Libron tenas en man' malfermata,
Kuşas krono sur muro rompita,
Li ĉielon rigardas kovrita,
De vualo mistere streĉata.

Laŭ longege de l' ter' homaropoj
Senkompate disiĝas, perdiĝas,
Kaj en fino de mond' neniĝas
Ŝajnigante lasttempe ombropoj.

Vel! Domaĝe! Anĝela plumeto
Oritinka penadis surskribon
De paĝar' korbata la vivon;
De la kron' al homaro almeto
Ĉiam estis celita, ho! ĉiam
Reĝon farus l' anĝelo de l' turo,
Sed homaron ja plaĉas forkuro
El grandeco; li reĝos neniam.

Estis reĝo la hom' paradiza
Kiam pace, laŭvole l' bestaron
Kaj la mildan, al li, vivantaron
Devigadis per movo irisa.

Sed elfalis la kron' al la tero
Kaj blekegis bestaro ĝardena
Ĝia kolo de ligo ferĉena
Ŝovigadis, kaj kvazaŭ rivero
Kuris for; ho! ja ŝajnas ke Dio
Sur la frunto de homo sigelis:
*La reĝecon el mi Di' forpelis;
Mi ne plue nomiĝos terdio!*

Homo! homo! rigardu kotita
Diademon smeraldan rubenan...
Sed ne timu, ĝin montros orplenan
Kiam estos vi reĝe vestita.

**

Kaj naskadis homaro homaron,
Disjetiĝis la homoj tra l' mondo,
Enradikis tra ĉie la fondo
Kiu tre interigis kamparon.

Flugilulo neĝvesta flugadis
Kvazaŭ kronon celanta kapmeti;
Oni pluvon aŭdadis tre peti
Kaj la mondo kaj homoj dronadis.

Tamen krono metita sur kapo
De malgranda homar' postvivanta
Brilis nur kiel fulmo kuranta
Post malhela, supera, nubfrapo.

Rekreskadis la homfamilio,
Malhumilo naskiĝis en koro
Kaj aŭdiĝis grandega terĥoro
Peteganta la kronon de Dio.
Ho, malsaĝa! Indigno ĉiela,
Batos vin; en la polvon disjetos,
Kaj sur vian kaparon li metos
Pli disiĝon ol regno pacbela.

Efektive; jam duonfarita
Leviĝadas turego tra l' vento
Ju pli kreskas en koro la sento
De grandeco de gloro sonĝita.

Sed subite l' agado haltiĝas;
Kroĉigante senordan vortaron
Amasigas la homoj l' ilaron;
Ne komprene, for ili disiĝas.

Ho! la perdon de lingvo deploris
La neĝvesta de l' tur' flugilulo!
Malaperis el ĝi l' izolulo,
Ade, mole la nubojn li boris.

**

Kiel fulmo brulema brilanta
Kavaliro pratempa rajdegis
Kaj kun semo de morto svingegis
Ĉien randon de glavo vibranta.
Vidu; flanke jam falis senspiraj
Aro granda da mil malamikoj,
Kiel teren tranĉitaj kalikoj
De florar' kaj folioj rondiraj.

Aleksandro ĉe kies palaco
Centnacia standardo flosadis
Kies luksa ŝtupar' konsistadis
De venkita tronar' el amaso...

Ho! li povas ornami, orkrone,
Sian kapon de granda mondreĝo;
Kiam li, jam mortema sur seĝo,
Parolanta nur estos duone,
La multeza brilaĵo klinigos
Tiel grandan tutmondan princegon;
Ĝi ja teren elfalos; regnegon
Blow' malforta de vent neniigos.
Kaj la mondo senregne rulanta
Jarcentare, atentos savonton

Kiu montros feliĉan la fonton
De la regno senĉese velkanta.

Jes, milfoje l' anĝelo sur pintoj
Post bataĵa nubega terbruno
Traglitigis radiojn de l' suno
Tra la kronoj por la batalintoj;
Ĉiam tamen la reĝ' promesita
Kaj la regno de homoj forpasis
Kaj l' anĝelo malgadis nin lasis
Kaj forflugis, kaj ploris ĝenita.

Ĉio pasas; rigardu, malriĉa,
Ĉirkaŭita de l' akva bluĉeno,
L' izolulon de Sankta Heleno
Pripensema je sort' malfeliĉa.
Generalo brilanta sur kampo
Forta nepre, fondadis regnegon
Ebenaĵe starigis reĝegon
Kaj de l' monto senvoja tra l' rampo.

Tamen mortis de tiu la gloro
Kaj disbatis ĝin forte la vento;
Ho! la regnon de homoj... la sento
Nur la sento levigos de l' koro.

La homamo, la dolĉa, trankvila
Delikata kaj frata kunveno
Kie regnas por ĉiam la beno
Kie trovas l' anaro gefila
La sanktecon de l' am' gefianĉa,
Ĉies amon gepatran varmegan
Kaj gepatroj filaron ĉarmegan
Kiel ruĝa rozar' unubranĉa.

Jam rapidas tra l' ventoj anĝelo
Manportante la kronon jarcentan
Rigardinte grandaron tutgentan
Kies estas nur unu la celo.
Ho! la regno de homoj per amo,
Amo tamen per lingva komuno,
Kaj la lingvo per filo de l' suno
Nia Majstro al kiu proklamo
Ĉiam estos senfina, korega,
Kaj ehiĝos en fino de l' mondo:


*Zamenhofa heroo la fondo
Estas regno de homoj pacega.*

ANGELO ELORZ,
C. M. F.

Gedonacantoj por la ordeno de Isabel la Katolika al S-ro D-ro L. L. Zamenhof, nia kara Majstro.

S-ro Codorniu, 10 ptj. — Perogordo,
10 ptj. — Guilmain, 5 ptj. — Ayza, 5 ptj. —
Liquiñano, 5 ptj. — Oneil, 5 ptj. — San Mi-
llán, 5 ptj. — Lozano, 2 ptj. — Múgica (S.),
2 ptj. — Múgica (F.), 2 ptj. — Elias Pérez,
2 ptj. — Redondo, 1 pto. — Núñez, 2 ptj. —
Benavente, 3 ptj. — Monteagudo, 2 ptj. —
P. Linares, 10 ptj. — Herrera, 5 ptj. —
A. Zumárraga, 2 ptj. — M. Martínez Pardo,
2 ptj. — J. Sarmiento, 1 pto. — S-ro J. Ale-
gria, 1 pto. — S-ro N. Maclean, 5 ptj. —
J. Cominges, 2 ptj. — J. Hilari, 1 pto. —
J. Santos, 3 ptj. — R. Pérez, 5 ptj. —
Geedzoj Alonso, 5 ptj. — S-ro C. Duques-
hay, 5 ptj. — M. Esteban, 10 ptj. — L. Casas,
10 ptj. — A. Rosique Hernández, 5 ptj. —
T. Latorre Campoy, 1 pto. — D. Rosique
Pérez, 1 pto. — E. Romero Ruiz, 1 pto. —
M. Franco Villarreal, 1 pto. — E. Solano
Rubio, 1 pto. — M. F. Baello, 1 pto. —
J. García Martínez, 1 pto. — J. Soler Martí-
nez, 1 pto. — G. Gómez de Tores, 1 pto. —
A. Revilla, 1 pto. — J. Iznardo Gutiérrez,
1 pto. — L. Calandre Lizana, 1 pto. — José
Maria Sabater, 2 ptj. — A. Ribas, 2 ptj. —
M. Macías Ruiz, 1 pto. — M. Navarro, 1 pto. —
S. Rodríguez González, 1 pto. — F-ino
C. Rosique Hernández, 5 ptj. — C. Garrido
Pérez, 1 pto. — S-ro E. Garrido López,
1 pto. — A. Sánchez Navarro, 1 pto. —

R. Sánchez Navarro, 1 pto. — J. Rodríguez
Martínez, 1 pto. — P. Echeñique, 1 pto. —
P. Baroja, 1 pto. — J. Madenán, 1 pto. —
C. Escobés, 3 ptj. — F-ino Resano, 1 pto. —
Esperantista Klubo de San Sebastián,
25 ptj. — S-orj P. Sannoma, 2 ptj. — Martín
Heredia, 1 pto. — S. O. de Arri, 1 pto. —
M. Urroz, 1 pto. — C. Antoñanzas, 1 pto. —
F-ino A. de Müller, 2 ptj. — S-ro A. Tuduri,
3 ptj. — F-ino M. C. Guerdain, 1 pto. —
S-ro B. L. Arrieta, 1 pto. — J. G. Rumorada,
1 pto. — F-ino M.ª Uranga, 1 pto. — B. Arri-
llaga, 1 pto. — F-ino Gil de Montes (C),
1 pto. — F-ino Gil de Montes (A), 1 pto. —
F-ino C. Mena, 1 pto. — S-roj P. G. Rodri-
guez, 1 pto. — P. G. Arrista, 1 pto. — P. Pe-
rea, 1 pto. — F. Nuez, 1 pto. — S. Pintado,
1 pto. — L. García Silva, 1 pto. — L. Beltrán
Castillo, 1 pto. — L. Gómez de Barneda,
1 pto. — E. Núñez y Núñez, 1 pto. — R. Gar-
cía Gómez, 1 pto. — J. Carrasco Cuenca,
1 pto. — J. Conde y Conde, 1 pto. — A. Valle
y Pérez, 1 pto. —
Grupo Esperantista de Córdoba, 20 ptj. —
» » » » » Girona, 10 ptj. —
» » » » » Murcia, 10 ptj. —
Artileria cep el La Coruña, 1'05 ptj. —
Espero Kataluna, 11 ptj. — Grupo Bilbao,
15 ptj. — Tute 293'05
La mondonacado estas ankoraŭ malfermata.



Esperantista Ekspozicio organizita de la Grupo ĈIAM ANTAŬEN!

ĈIAM ANTAŬEN

La ekspozicio de la agema grupo «Ĉiam Antaŭen» estas fermita. Al tiuj kiuj ĝin ne vizitis, nia fotografaĵo donos ideon de ĝia graveco. Sen ia dubo ĝi estis unu el la plej bone preparitaj el ĉiuj similaj festoj okazintaj en Katalunujo. La Komitato de tiu imitinda grupo prezentis antaŭtempe projekton al la anaro kiu unuanime sankciis ĝin spite la rimarko de la citita komitato koncerne la financon staton. Tuj estis starigitaj komisionoj por entrepreni ĉiujn konvenajn aranĝojn kaj depost la Septembra monato la laborado estis senĉesa por efektiviĝi la realigon de tiu idealo. Deca tempe estis disdonitaj luksaj programoj anoncantaj ĉiujn festojn, kiuj komenciĝis la 27^{an} Novembro per la malfermo de la Ekspozicio.

El la strato oni povis vidi la flagon flagranta ĉe la balkono; la enirejo kaj ŝtuparo alkondukantaj en la salono gaje kaj bele aspektis kaŭze de diversaj florpotoj ilin ornamentaj, kaj fine la salono tute diferencigis sin de la ordinaraj tagoj. Ja, la grupo estis en festo. Je la unua rigardo la vizitanto estis atentata de supermezura kvinpinta stelo alfiksa ĉe la plafono kiu preskaŭ estis tute okupata de ĝi, sin demandante certe kiom da tempo kaj kiom da pacienco pasigita en ĝia konstruado estis bezonata; kontraŭ la enirejo staris granda portreto de nia karega Majstro «La ĉefpaciganto de l'homaro», kompletigante la simbolon de l' du kruciĝintaj branĉoj, palmarba kaj olivarba respektive, interligitaj de rubandoj el silko en bantoformo montrantaj la landkolorojn de Katalunujo kaj Esperanto. Ĉe la muroj estis kvazaŭ reto en kiu staris grandnombro da poŝtkartoj, ordigitaj kaj apartigitaj laŭ landoj kaj mondpartoj. Sub ili, en alia reto staris la esperantista gazetararo riprezentata de 204 gazetoj eldonitaj ĉen pli ol 40 malsamaj landoj. Ĉe la centro de la salono staris longa tablo sur kiu estis admirindaj specimenoj de nia literaturo, nome: verkoj, broŝuroj, ŝlosiloj, kogreskartoj k. t. p. Apud la muroj estis rondaj tabuloj sur kiuj estis sternataj presaĵoj pocente.

Okaze de la Ekspozicio estis organizitaj aliaj festoj kiuj havis lokon la 4^{an} Decembro en «Fomento Martinense», okazinte koncerto kaj monologo *Okaza Artisto*, ludita de S-ro Albiñana. Kaŭze de la nuboj kiuj profetis nenion bonan la halo nur estis duone plenigita atinginte tamen, multe da aplaŭdoj la fama noro «Orfeo Canigó», kiu kantis belajn katalunajn popolokantojn. Finiĝis la festo per nia himno «La Espero», kantita de ĉiuj ĉeestintoj.

La festo organizita en «Ateneo Obrero Martinense» la 11^{an} Decembron kompensis ĝian organizintojn ĉar la granda halo de tiu Societo apenaŭ sufiĉis engluti la envenintojn. Estis prezentita la kataluna dramo unuakta *Juventut*, plie la dulingva «Vivu Esperanto», de la klera samideano M. Cases, kies teatraĵo amuzis kaj eksplodigis je rido la tiean publikon. La geanaro de «Ĉiam Antaŭen» kolektiĝis sur la scenejo kaj kantis unufoje sian himnon verkita por ĝi de nia fama samideano S-ro F. Pujulá i Vallès, kies muzikon komponis S-ro Lambert. La ĉeestantaro silente ĝuis la kantadon kaj rekompencis la kantintojn per tondraj aplaŭdoj. Ankaŭ «La Espero» estis kantita de la membroj de «Ĉiam Antaŭen» dum la flagoj de kelkaj grupoj salutis la himnon. Sed grava estis la balo per kiu la anoj de la dirita «Ateneo», honorigis la geesperantistojn la dimanĉan vesperon. Preskaŭ ne eble estis paŝi en la halo pro la puŝoj de la gedancantaj paroj. «Ĉiam Antaŭen» donacis al ĉiuj fraŭlinoj belajn esperantistajn bukedetojn kiel memoraĵo, de tiu neforgesebla festo. La membroj de «Ĉiam Antaŭen» kunvenis la 18^{an} Decembro kaj festis per intima festeno la fermon de la Ekspozicio kaj samtempe la 51^{an} naskiĝtagon revenon de D-ro Zamenhof.

Meritas apartan dankon la laboristaj societo j«Fomento Martinense» kaj

«Ateneo Obrero Martinense», pro esti metintaj sub la dispono de «Ĉiam Antaŭen» ilian halon kaj ankoraŭ pro ilia helpo al la propagando de nia ideo. Precipe al S-ro C. Bicknell el Bördighera ni esprimas sinceran dankon je la nomo de «Ĉiam Antaŭen» kaj ni estas ĝojaj tial ke la rezultatoj atingitaj superas la esperojn de la organizintoj de la Ekspozicio.

Tiaj procedoj estas vere imitindaj, tial ke nur dank' al konstanta propagando ni povos venki la indiferentecon de la skeptikularo kaj alvarbi al nia komuna celo novajn adeptojn.

DIVERSAJ SCIIGOJ

La Rondo. — Por solenigi la datrevenon de la fondiĝo de tiu-ĉi Grupo, oni organizis la nokton de la 28^{an} de Januaro, teatraĵon.

La teatrasalono, estas grandeta; la teatro malgranda, sed bela; kaj kontraŭ la teatro en etaĝo ornamita per esperantaj flagoj, sur blanka tuko, mi legis *Vivu Esperanto*.

La festo komenciĝis kaj oni ludis «Mistero de Doloro», de S-ro Gual, kaj traduko de S-ro Pujula.

S-ro Valero, ludis laŭdinde, sed momenton li estis tro ekscitata; Sinjoro Campdelacreu bone, tamen tro mallaŭte; S-ro Bermudez ankaŭ bone: F-inoj Luis kaj Reig, kvankam ili, dum scenoj ne sufiĉe sentis, kaj ludis iomete malvarme, ili estis laŭdindaj.

Forlasante la antaŭajn rimarkojn, sincere mi konfesas ke ĉiuj atingis gloran sukceson, mirigante la ĉeestantojn, kiuj ne kredis pri tiu rezultato.

Je la fino, la publiko rekompencis la laboron de la geludintoj, aŭtoro kaj tradukinto, per varma aplaŭdado.

Poste oni ludis *La Santa*; gratulon al ĉiuj, precipe S-ro Valero.

Post la dancado, je la 2^a kaj kvarono de la dimanĉa taĝo, la publiko, kiu plenigis la salonon, foriris. Inter ili, mi.

Akceptu karaj samideanoj de *La Rondo*, mian gratuladon por la organizo de la festo kaj ĝia bela rezultato.

JEN

Agrablaĵo. — Laŭ ni legis en nia ĉiutaga enlanda ĵurnalo *Las Noticias (La Sciigoj)*, de la 16^a januaro, nia kara amiko kaj kunlaboranto S-ro Stanislao Pellicer, nuna Vicprezidanto de *Espero Kataluna*, sukcesis en la konkurso malfermita de la Societo «Económica d'Amics del País» (*Ŝparema de la Enlandaj Amikoj*) por premii la plej bonan Gramatikon de Esperanto por la infanoj.

La premio, atingita de nia amiko, konsistis el kelkaj Esperantistaj verkoj.

Nian plej koran gratulon!

Vendrell. Grupo Frateco. — Tiu ĉi Grupo en kunveno okazinta antaŭ kelkaj tagoj elektis la jenan Administran Konsilantaron: Prezidanto, Jakobo Marcé; Sekretario, Johano Constanti; Kasisto, Mageno Güell; Voĉdonantoj Savinto Esvertit, kaj Ramono Corbella.

Ankaŭ oni interkonsentis inaŭguracii ĝian verdan standardon por la Glora tago el la Vendrell'anoj, la kvaran de Marto venonta.

Vilanova i Geltrú. — En kunveno okazinta ĉe la Grupo «Laboro Esperanta», por nomi novan direktan komitaton, restis elektitaj la jenaj gesin-

jeroj: Prezidanto, S-ro F. Mestres; Sekretario, M. Vadell; Sekretariino por eksterlando, F-ino T. Rosell; Kasisto, M. Vives; Bibliotekisto, M. Mas; Voĉdonantoj, L. Codina kaj J. Perez.

Palafrugell. — La societo «Paco kaj Amo», en pasinta kunveno okazinta je la 4^a de la kuranta Januaro elektis la jenan Direktan komitaton:

Prezidanto, Jozefo Boix, Vic-prezidanto, F. Sagrera Cendra, Sekretario, Petro Raj, Vic-Sekretario, Julio Llavià, Kasisto, Jozefo Marqués, Bibliotekisto, Elviro Campamar; Voĉdonantoj; Raimundino Aulestia, Mario Mestres, Pilaro Deulofeu, Terezo Gaillart.

La sama komitato estis nomita kiel «Organiza Komitato» de la Geronprovinca Kongreso kiu okazos tie je la Aŭgusta monato eble.

Grava nova kurso. — La propagandema Grupo «Barcelona Stelo», malfermis, la 5^{an} de Januaro, novan kurson nur por tramveturilistoj kiu dank' al la fervoreco kaj helpado de S-ro Foronda, estro de la Barcelona tramveturilaro, multe sukcesas. Ĝi daurigas ĉiun lundon kaj jaŭdon ĉeestante multe nombro da lernantoj. Kuraĝo «Barcelona Stelo», pro tiu nova sukceso kaj daŭrigu laborante por la bono de Esperanto.

Kondolencoj. — Nian plej profundan ni sendas al kordolorita Sinjoro J. Garzon Ruiz, Direktoro de la «Gazeto Hispana», kiu suferis la malfeliĉon perdi sian okjaran filon Joĉjo, tre lerta esperantisteto.

Gravega. — La 30^{an} de la lasta Januaro niaj Madridaj samideanoj la agemaj S-roj Román Ayza, Jozefo Perogordo kaj aliaj, vizitis la Ministran Moŝton de publika instruado, por transdoni al li longan petskribon por atingi la enkondukon de Esperanto en la jenaj lernejoj: Nacia de Idiomoj, Supera de la Instruado, Supera de la Comercio, Normalaj por ambaŭ seksoj, Universita kaj Institutaj. Lia Moŝto certigis ke li estas *konvinkita* pri la utileco de Esperanto kaj tre afable promesis komplezi kiam eble la vizitantojn.

Mistera krimo. — Ne terurigu! La afero estas tute simpla. S-ro Cases, kiu ricevis multajn skribaĵojn laŭdante tiun amuzan komedieton, tiel nomata, *dankas ĉiujn ĝenerale, pro manko da tempo por tion fari individue.*

Gazeto Hispana. — Ĝi estas la ĵus malaperinta «Gazeto Andaluzia», kiu sin prezentas laŭ nova aspekto dirante: «La infano plenaĝiĝis; kaj, por eniri plene en la socialan rondon, ĝi edziĝis kun la Hispana Societo por propagandi Esperanton (H. S. p. E.), edziĝo el kiu ni esperas tre profitan rezultaton.»

Tiel estu, ni kore deziras.

BIBLIOGRAFIO

DU NOVELOJ el Maŭro Jokai. El la hungara lingvo tradukis Johano de Luczenbacher. Presa Esperantista Societo. Prezo 1'25 fr.

Nun malmulton mi konis de la hungara verkisto Jokai: la novelo *La dama dels ulls de mar*, (La virino de la markoloraj okuloj), publikigita en kataluna lingvo ĉe la kolekto de la ekzistinta ĵurnalo *La Renaixensa*, estis la sola verko kiu ĝis nun konatigis min kun la genio kaj talento de l'nacia hungara aŭtoro.

Johano de Luczenbacher aperigis en Esperanto du jokai'ajn rakontojn. El tiuj, la titolita «Pola Rakonto», estas laŭ mia opinio la plej interesa; la stilo estas tre korekta kaj flua, kaj konscience pri laborita. Resume, la verko estas leginda.—J. B. M.

Resumo de la Teorio de ANTIDO kun lingvaj kritikoj kaj klarigoj de konataj Esperantistoj kaj Idistoj. Prezo: 5m. 20 Universala Esperanta Librejo.—10, rue de la Bourse. Genève.

SESA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO (Washington, 14-20 Aŭgusto 1910). Prezo: 1 fr. Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy. Paris.

AVIZO.—Al S-roj Abonantoj, kiuj ankoraŭ ne sendis la jaran abonpagon, ni petas ĝin sendi kiel eble plej baldaŭ.

REDAKCIA KORESPONDADO

S-ro L. R.—Atentante la proverbon: *Estas devigo lavi en la hejmo la malpuran tolaŝaron*, certe ni ne publikigos Vian artikolon «Nun la sciencoj progresas». Cu Vi komprenas? Do, sufiĉe kaj ne ĝeniĝu!—S-ro Em. B.—Koran dankon! Ĝi aperos; sed, kompreneble, ni ne povas certigi al Vi, kiel nek kiam.—S-ro J. B. de E. kaj P.—Antaŭ ne longe, ni jam konstatigis en TUTMONDA ESPERO ke oni nur aperigus en ĝi tiuj sciigoj, raportojn, artikolojn... k. t. p. Esperante redaktitajn.—S-ro P. A. A. de L. R.—Kvankam fervoraj kaj konvinkitaj Esperantistoj, ni nur publikigos, el Viaj sendaĵoj, tiujn *ne verdajn*.—S-ro J. B. de Ĉ. A.—Danké akceptitaj Viaj humoraĵoj.—Sinjoro A. N. el V.—Dankon pro Via lasta sendaĵo. Pri la alia afero, ni komprenas kaj konfesas ke Vi estas prava; sed ni esperas ke Vi ankaŭ konsentos ke ni ne estas kulpaj.—S-ro R. A. el M.—La problemo, kiun ni dankas, aperos kiam eble plej baldaŭ.—S-ro J. V.—Viajn plaĉindajn poeziojn tre ĝoje ni ricevis.

M. C.

ESPERO KATALUNA

TALLERS, 81, ĈEFA ETAGO
BARCELONO

La plej malnova Esperantista Societo el Katalunlando

Biblioteko kun pli ol 300 volumoj.

Ankaŭ pli ol 70 nunaj kaj diversaj gazetoj kaj revuoj Esperantistaj ĉiam legeblaj.

Senpagaj kursoj de Esperanto, klarigitaj de lertaj geesperantistoj.

Amuzaj "Verdaj Vendredoj" por praktiki Esperanton.

Teatraj prezentadoj, ekskursoj, festenoj, k. c.

MONATA KOTIZAĴO 1 Peseto

R. TOBELLÀ | 16-CARMEN-18 | BARCELONA

DUOBLA INTERMETO HIEOROGLIFA

MUZIKO

METANTE INTER la supran hieoroglifan esprimon, kion signifas la suba esprimo:

PREPOZICIO

rezultos la jenan vorton:

PLANTAĴO

(Sciencas vorto)

METANTE INTER la supran hieoroglifan esprimon, kion signifas la suba esprimo:

GLACIIGINTAĴO

rezultos la jenan vorton:

METALO

NOVEJARQUE (A)

ESPERANTISTA POŝKALENDARO por la Jaro 1911

Redaktoro: Prof. Dro Siegf. Lederer, Prago.

Ĝia enhavo, eĉ pli riĉa ol tiu de la antaŭaj eldonoj, konsistas el ambaŭstila kalendaro, interesaj artikoloj, praktikaj tabeloj kaj kompleta listo de ĉiuj grupoj esperantistaj. Speciale ni atentigas pri nia enigma konkurso, 100 M. da monpremioj


Prezo: 1 M. (0,500 Sm); aŭfrankite ĉien 1.20 M. (0,600 Sm).

Por mandatoj ĝis la 15^a de Novembro: 0,80 M. (0,400 Sm), aŭfrankite ĉien 1, - M. (0,500 Sm).

Oni postulu specialan prospekton de Esperanto Verlag Möller & Borel
Berlin SW. 68, Lindenstr. 18-19

MANUFAKTURO DE KOMERCAĴOJ POR VOJAĜI

ONI VENDAS MALALTPREZE



Manuelo Ballespi

Strato Ample, 43-BARCELONA